Mi neniel partoprenos novan militon, ĉar **mi kiel: socialisto** scias, ke por efektivigi socialismon necesas abundo, kiun la milito nur detruas. Mi scias, ke en milito venkas nur registoj kaj militistoj, kiuj neniam donos socialismon. Socialisto cetere ne batalas batalon; per armiloj de barbaroj, nek subtenas tian

**sennaciisto** scias, ke tute ne gravas kie kuŝas la landlimoj: nur gravas ilia forigo;

**kontraŭmilitisto** scias, ke milito estas malbono, kiu neniel povas naski bonon, sed nur naskas novajn militojn.

Kaj al la Bluaj (Violaj) timemuloj ili diros:

La milito, kiun vi opinias necesa aŭ neevitebla, havas jenajn ŝancojn: 100 % an, ke la plej bonaj homaranoj estos forbuĉataj, kaj la rezultatoj de jarcenta produktado estos neniigataj. La nura certa rezultado de iu ajn milito estas: Pligrandiĝo de la materia, spirita kaj morala malriĉeco de la popoloj.

50 % an, ke la Violuloj (Bluuloj venkos, kaj ne „vi mem". Tiukaze vi tute vane militis. 50 % an, ke via propra registaro venkos (sed ne vi mem). Tiukaze vi restos same dependa kiel ĝis nun. La batalo kontraŭ via propra registaro kaj viaj propraj kapitalistoj devos rekomenciĝi, sed vi tiam estos malfortiĝintaj kaj viaj registaro kaj kapitalistoj plifortiĝintaj.

Ĉu nova milito denove logas vin?

N. N.1).

1) La verkinto petis anoniman subskribon, sed pretas koresp. pri la demando kun legintoj, pere de la Red.



# LIBERPENSULA ANGULO

**La mortkanto de nia cigno.**

Estas malĝojiga fakto, ke la maljuna cigno de nia eŭropa civilizo kantis sian lastan kanton. La tempo naskiĝis el nekonata fonto en la universo, k ĝi fluas senhalte al la maro de la eterneco. Sur nia tero ne nur la sezonoj regule alternas, sed ankaŭ la tagoj k noktoj.

Kiam la homa spirito pli k pli disvolviĝis, la deziro vekiĝis dispartigi la tempospacon de tagoj k noktoj laŭ pli malgrandaj subpartoj. Tiel ekestis horoj, minutoj k sekundoj. Sed por orienti sin en tiu tempdivido kun ekzakto, oni ja bezonis tempmezurilojn. Tiucele oni konstruis la horloĝojn en multnombraj formoj k aspektoj.

Mi petas vin atenti pri la dogmo en la malnova juda k aliaj tiamaj religioj, laŭ kiu nia tero estas la centra punkto de la universo, k laŭ kiu suno, luno k steloj moviĝas ĉirkaŭ la tero, laŭ la ordonoj de iu supernatura estaĵo (nomata dio).

Ankaŭ la kristana eklezio, kun sia papo en Romo kiel ĉefo k posteulo de la apostolo Petro, proklamis la saman koncepton kiel veron. Dume la scienco konstante evoluis, ĝis en la 16a jarcento Koperniko k Galileo konstatis la fakton, ke nia tero tute ne estas la centro de l' universo, sed ke ĝi moviĝas ĉirkaŭ la suno. Kvankam la tiutempa papo ne ankoraŭ tiel arogis, kiel lia posteulo, kiu pretendis esti neerarkapabla, tiu konstato povus esti katastrofa por la aŭtoritato de la eklezio, k pro tio ĝi devigis Galileon malkonfesi sian deklaron. Ĉirkaŭ du jarcentoj la katolika eklezio trompis siajn kredulojn, ĝis ĝi estis devigata konfesi sian eraron.

Sed ne nur la katolika potenco, sed ankaŭ la protestanta alo timas la raciigon de la homoj. En 1939 (se mi ne eraras) protestanta pastro k nederlanda ministro, de Wilde, malpermesis al la liberpensula organizo „De Vrijdenker" uzi la radio-mikrofonon pro timo je la kleriga efiko. Ĝis la nuna tago tiu raciiga instruado al la popolo ne ankoraŭ estas permesata. La enciklika de l' nun reganta papo Pio XII-a pri **homa estiĝo** ne diferencas laŭ malvasta ortodokso de tiuj el la kvar antaŭaj jarcentoj. Kiu kuraĝas postuli, en nia jarcento, ke scienculoj, inventistoj, teknikistoj k.a., kiuj havas novajn ideojn, submetu unue ilin al cenzuro de sankta kolegio el magistroj starantaj same kiel la sanktaj marabuoj sur unu piedo apud la bordo de l' Stiks-rivero?

Kial katolikoj k protestantoj agas sammaniere? Ĉar ambaŭ miksas la ideojn pri tempmezuriloj k tempo. Ja la tempo antaŭenpaŝas en Eŭropo k en la tuta mondo; scienco k tekniko plue konkeras terenon. En religiaj medioj kreiĝis spirita vakuo, kiu profitas nur al la misiistoj en Nova Gvineo, kie la indiĝena spirita nivelo ne superas tiun de la konvertistoj. En Koreo tondras la kanonoj, verŝiĝas sangotorentoj, k la malnova eŭropa civilizo tremas sub la minaco de tiu danĝero...... tra la nokto sonas la lasta himno de nia maljuniĝinta cigno.

**Ariadno.**

MARK TŬEN (TWAIN) SKRIBIS:

Estas rimarkinda progreso. Dum kvin aŭ ses mil jaroj, kvin aŭ ses altaj civilizoj naskiĝis, progresis, estradis la mirindaĵojn de la mondo, poste velkis k malaperis; k eĉ ne unu el ili, escepte nur la plej malfruaj, iam eltrovis iun rapidegan k adekvatan manieron por mortigi homojn. Ili ĉiuj faris sian plej-bonon, ĉar mortigi estis la ĉefa ambicio de la homa genro k la plej frua okazaĵo en ĝia historio — sed nur la kristana civilizo gajnis triumfon, pri kiu ĝi povas fieri. Post du aŭ tri jarcentoj oni agnoskos, ke ĉiuj kompetentaj murdistoj estas kristanoj; tiam la pagana mondo prenos lecionojn ĉe la kristana — ne por akiri ĝian religion, sed ĝiajn bombojn. La turko k ĉino aĉetos tiajn por mortigi la misiistojn k iliajn konvertitojn kune.

(Trad. 22.979).

La modesto rilatas al la merito, kiel la ombroj al la figuroj de pentraĵo: ĝi donas forton k elstarecon.

**La Brujer (Bruyère).**

# KORESPONDA SERVO DE SAT (CENTRO)

München 23, Belgradstr. 64/4 M. Robert E. Bitzer (Bicer).

**Korespondpetantoj** estas el 28 landoj: Alĝerio 2, Angolo 1, Aŭstrio 11, Belgio 72, Brazilio 10, Britio 16, Bulgario 6, Ĉeĥoslo. 83, Danio 3, Finlando 1, Francio 113, Germanio 238, Hispanio 2, Hungario 8, Italio 2, Izraelio 1, Japanio 369, Jugoslavio 4, Koreio 1, Maroko 1, Nederl. 74, Norvegio 8, Polio 2, Portugalio 3, Sarlando 2, Svedio 21, Svisio 1, Usono 3 = **sume 1058 gek-doj.**

El tiu nombro mi sukcesis interligi ĝis nun 480 gek-dojn; sendante al ili po 2 adresoj mi interligis sume 1440 gekdojn.

Ĉu la adresperando ĉiam estas sukcesplena? — mi dubas. Laŭ la maniero de nia perado ĉiu priservita petinto devas resendi la konfirman „Folioparto I", poste „Folioparto II". Jen fakte resendis Folioparton I 262 gekdoj, Folioparton II 52 gekdoj, el sume 480 priservitoj! 8 revenis kun negativa rezulto.

El la 480 priservitoj unu prijuĝis nian Servon **„senorda, sendisciplina, k pro tiu kaŭzo sincera korespondado inter gekamaradoj nuntempe ne ebla".** Kelkaj laŭdis nian Servon, la plej granda parto ĝin simple akceptis kiel taŭgan Mi plenintence citis la unununuran malfavoran juĝon por insisti, ke unuavice la petantoj nepre citu ĉiujn detalojn pri si mem, por ke mi sciu ĉu la petanto estas — ina aŭ vira. Citante nur nomon, adreson k aĝon, kiel faris la nomito mi devas diveni, kion li deziras k poste li respondas... (vidu supre!)

Malgraŭ ke la citita afero iel amuzis min, ĝi tamen havas tre seriozan flankon: ju pli precizaj estas la datoj de l' petantoj, des pli akurate mi povas servi ilin! Do plifaciligu mian laboron, citante viajn dezirojn k personajn detalojn!

Nia servo sin mem financas, ĝi ne estas subtenata de alia flanko. Tial ĉiuj petantoj, laŭ sia povo aldonu al siaj leteroj internaciajn respondkuponojn — ju pli, des pli bone. Jen la „bilanco":

| | |
|---|---|
| Pruntita sumo komenca | 65.— DM. |
| Afranko alveninta | 54.32 DM. |
| | 119.32 DM. |
| Elspezoj komencaj | 47.75 DM. |
| Afrankoj ĝisnunaj | 54.83 DM. |
| | 102.58 DM. |
| Disponebla sumo | 16.74 DM. |

En tiuj sumoj ne troviĝas la kostoj por presado de la Serva materialo: kovertoj, adrespera letero k poraktuja folio; tiujn materialojn mi akiris el rondoj akcelantaj nian servon (temas pri sumo de pli ol 300 DM.).

La plej granda parto el petantoj „forgesas" aldoni la reafrankon en formo de respondkuponoj, tial nia servo pene baraktas kontraŭ financa malbonfarto, sed mi estas certa, ke la situacio pliboniĝos, post lego de tiu ĉi raporto!?

Poŝt-iro: Malbone funkcias nia servo al Aŭstrio, Ĉeĥio, Brazilio, Hispanio, Polio.

Momente ĝi ne funkcias al Koreio.

Preskaŭ senescepte la „Foliopartoj" ne revenas el Ĉeĥio, (motivo ne konata); malbone funkcias la reveno el la soveta zono de Germanio, el la aliaj landoj iam k tiam revenas kelkaj.

**Perantoj:**

Britio: k-dino Bowden M.E., „Clarach", Abbey Drive, Upper Cronant, **Prestatyn,** N.-Wales.

Francio: SAT-Amikaro, Koresp. Servo, 9 rue des Murs, **Reims** (Marne).

Germanio: k-do Bitzer R. E., **München 23,** Belgradstr. 64/4 M.

Nederlando: k-do Slotegraaf W., 's Gravezandelaan 135, **Hago.**

Polio: k-do Rogalinski Tad., Kartowicza 1/7 m. 100, **Warszawa.**

Belgio: Beeckmans J., Plant, Morestuslei 95, **Antverpeno.**

**Korespondpetojn individuajn** senescepte direktu al nia adreso, **ne** al SAT-Parizo! „S-ulo" publikigas nur korespondpetojn kun specialaj celoj (peto pri propagandmaterialo, K.S.).

La ne-sennaciista mondo, kiel kutime, ree furioziĝis k inter mortigas sin: helpu, kunagu, por plifirmigi la scion pri la egalo de ĉiuj homoj, rasoj k haŭtkoloroj en la mondo! Ekagu per mondskala interkorespondado!

**Rob. E. Bitzer.**